NIA VOĈO
Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98-4ª.28012 Madrid
☎ lunde vespere (91) 530 87 98
Redaktas kaj eraras Lupe Sanz
MAJO 1996

**KOTIZO POR 1996 KUN DONACO**

*La kotizo por tiu-ĉi jaro estas sama ol la lastaj* ***kvar*** *jaroj. Bv. se vi ankoraŭ ne abonis ĝin* ***sendi ĉekon po 2.000 PTA,*** *je la nomo de ESPERANTO-LICEO DE MADRID. Antaŭ-dankon pro via kontribuo al daŭrigado de MEL.*

Pro la altiĝo de la procento pagenda al banko NI PETAS AL MEMBROJ KIUJ PAGIS PER BANKO KE ILI PAGU PER ĈEKO ***Se vi pagas rekte ĉe la Liceo (lunde vespere) vi ricevos kiel donacon, la libron "Historia del Esperanto en Madrid",*** *dulingva versio verkita de Lupe Sanz Bueno.*

**ESPERANTA BIBLIOTEKO "Ramón Molera"**

Dum 47 jaroj Ramón Molera Pedrals (1922-1983) laboris por Esperanto, kaj iom post iom li sukcesis krei gravan Esperanto-Bibliotekon, kies interesan kolekton da libroj kaj periodaĵoj li akiradis per aĉeto aŭ interŝango, danke al siaj multaj kontaktoj kun bonvolaj esperantistoj ĉiulandaj. La biblioteko havas pli ol 3.500 libroj kaj la kolekto de la Espernato periodaĵo konsistas el pi ol 1.320 malsamaj titoloj de gazetoj, bultenoj, informiloj, k.t.p., de la periodo 1887 ĝis 1986, kun 6.511 jarkolektoj el kiuj 3.936 estas kompletaj. Apartaj kolektoj temas pri: Fotoj de esperantistoj, insignoj, muzikaĵoj, altranĉaĵoj de naciaj gazetoj, poŝtstampoj, poŝtmarkoj, poŝtkartoj, k.t.p.

Lia filino, Ana María Molera, katalogis la kolekton kaj eldonis katalogon de Esperanto-revuoj daŭrigante la laboron de la patro. La biblioteko situata en Moiá, vilaĝeto de 3.000 enloĝantoj, je distanco 50 km de Barcelona, estas malfermita de lundo ĝis jaŭdo matene.

**RADIO VATICANO**

Dum Paŝka mesaĝo la Papo salutis en esperanto, antaŭ en la pola.

*Esperanto*

Karegaj Gefratoj, ni memorigas niajn ekstervicajn elsendojn en Esperanto dum 1996: 8an de aprilo, 15an kaj 16an de aùgusto, 1an de novembro, 24a, 26a kaj 31a de decembro.



*En la ĉi-suba foto videblas la ĉefepiskopon de Prago, Lia Eminenco Kardinalo Miloslav Vlk, intervjuata de nia kunlaboranto Carlo Sarandrea, okaze de la IKUE-Kongreso en Olomouc.*

**VIZITANTOJ**

Hristo kaj Ceco Filipov, bulgaraj esperantistoj estas en Madrido pro laboraj kialoj. Temas pri fratoj kiuj antaŭ kelkaj jaroj organizis laborbrigadon en Pleven al kiu partoprenis esperantistoj de Bilbao, ili ĉeestas nian konversacian rondon.

**ESPERANTO ĴURNALE**

Revuo kiun vendas senlaboruloj je la stratoj, nomita "La calle", publikigas en ĝia n-ro 15a du paĝajn artikolon pri esperanto. La informoj venas el la "Grupo de Bilbao". Bedaŭrinde ne aperas adreso aŭ telefonnumero.

**HISPANA-ESPERANTA VORTARO**

Miguel G. Adúriz, Luis Ojer, A. Casquero kpt. parolis pri la temo en El Puig. Libroservo, Galofré kaj Madrida Liceo sendis letere komentariojn je la senso de unue reeldoni Lexicon Sopena kaj poste, trankvile fari novan vortareton. Ni atendas oficialajn konkludojn de la kunveno.

**PREMIO KLARA SILBERNIK 1996**

Kadre de la 55-a Hispana Kongreso okazonta en Murcio (12-17a de julio), estos liverata tiu honora Premio al s-ino Dolores Egea Estañ, edzino de la HEF-kasisto José Mª Bernabeu Franco, el Callosa de Segura, pro ŝia senkondica apogo al sia edzo en lia konstanta tasko por esperanto.

## HISPANIO

Dum la 7a Kongreso de Valencia-Murcia Esperanto Federacio okazinta en **El Puig (Valencia)** prelegis MELano Miguel Fernández pri "Mauro Nervi: Poeto ĉe havenoj"

La prezidanto de Esperanto-ligo de Bosnio-Hercegovino vizitis **Katalunion**, la celo estos diskuti "projekton pri la rekonstruo de la asocia reto en B-H". La vizito estis modele organizita eĉ sur alta diplomatia nivelo, kaj ĝi tutcerte kontribuos al pli socia prestiĝo de la esperanto movado en Hispanio. (HdH)

## "Nia voĉo" DISTRIBUADO

Pro la altiĝo de la poŝtmark-prezo:15 PTA por Madrido kaj 19 por provincoj ni nur sendos **EKDE JUNIO** al jenaj: membroj de MEL kiuj pagis 1995an kotizon, hispanaj esperantaj grupoj kiuj sendas al MEL siajn revuojn. Aliaj grupoj povas ricevi ĝin kontraŭ 68 poŝtmarkoj po 15 ESP (1.020 ESP).

## NI DANKAS AL GRUPOJ KAJ SIMPATIANOJ KIUJ JAM SENDIS POŜTMARKOJN

## VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Ĉiu-lunde ni kunvenos, ekde la 18,30 horo, ĉe MEL, Atocha 98-4°

Marde kaj jaŭde (18,00 ĝis la 20,30 h) funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3°-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson (91) 446 80 79

**Prelegoj** dum venontaj monatoj, ĉe MEL je la 19,00 horo.
13a de majo. "La nura anarkiismo". L. Ojer
10a de junio "Madrido ekde la ĉielo" L. Sanz

**Kursoj**:
Centro Cultural "Maestro Alonso" (kvartalo Ventas). Merkrede 18.30 ĝis 20.00.
Centro de Día Puente de Toledo. Mercedes Arteaga 18
Liceo. Lunde kaj merkrede 18.00 19.30. Atocha 98.

Koruso **"Verda Stelo"**:
25a de majo je la 19.00 horo ludos ĉe Ateneo de Madrid. Prado 21,

## KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

48a Kongreso de IFEF. 11-18 majo Hago (Holanda)
55a Hispana Esperanto Kongreso. 12-17a julio. Murcio
81a Universala Kongreso de Esperanto. 21-28 julio Prag[illegible]ekio)

**VALENCIA ESPERANTO-GRU[illegible]RGANIZ[illegible]U KARAVANOJN AL PRAGO,**
**★ 1.- aŭtobuso al Poprad kaj Praga, du semajnoj por 7[illegible] ESP**
**★ 2.- aviadilo + loĝado al Praga, 72.000 ESP**
**Petu informojn (96) 384 96 16**

4-a Internacia Kultura kaj Turisma Esperanto-semajno. 5-12a [illegible]obro. Calella ([illegible]lona)

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

ESPERANTO LICEO DE MADRID
Atocha 98-4°
28012 Madrid
Asociación de Utilidad Pública Municipal